

Михаил Лермонтов,  
Anĝelo

*tradukita de Vasiliĵ Devjat-  
nin*

En mezo de nokto, en blua  
ĉielo,  
Traflugis kaj kantis plej bela  
anĝelo.  
Kaj nuboj kaj steloj kaj lun'  
en irado  
Atentis kun ĝojo je l' sankta  
kantado.

Li kantis feliĉajn, neniam  
pekantajn  
Spiritojn, kun Di' en ĉielo  
loĝantajn;  
Li kantis pri Patro ĉiela kaj  
tera—  
Kaj lia laŭdado ne estis mal-  
vera.

Animon tre junan en brakoj  
li tenis;  
En mondo malgaja naskiĝi  
ĝi venis.  
Kaj sono de l' kanto en juna  
animo  
Restadis sen vort', sed kun  
viva estimo.

Tre longe en mondo ĝi estis  
premata,  
Je revo mirinda pri Di' ple-  
nigata!  
Kaj ŝanĝi la kanton de l'  
sankta sincero  
Ne povis por ĝi ĉiuj kantoj  
de l' tero.

...

Михаил Лермонтов,  
The Angel

*tradukita de N. N. 97*

At midnight an angel was crossing  
the sky,  
And quietly he sang;  
The moon and the stars and the con-  
course of clouds  
Paid heed to his heavenly song.

He sang of the bliss of the innocent  
souls  
In heavenly gardens above;  
Of almighty God he sang out, and  
his praise  
Was pure and sincere.

He bore in his arms a young soul  
To our valley of sorrow and tears;  
The young soul remembered the hea-  
venly song  
So vivid and yet without words.

And long did it struggle on earth,  
With wondrous desire imbued;  
But none of the tedious songs of our  
earth  
Could rival celestial song.

...

Михаил Лермонтов,  
Der Engel

*tradukita de N. N. 98*

Argiope-informo:  
La aspekto de tiu ĉi versio  
estas barita.  
Supozeble la aŭtoro decidis  
tion.

...

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de VASILIJ DEVJATNIN (\*1862 – †1938).*

*Arg-1039-2114 (2014-06-03 12:21:00)*

*Pri la tradukinto vidu la vikipediejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij\\_Devjatnin](http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin).*

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27) en la Anglan de N. N. 97.*

*Arg-1039-2111 (2014-06-03 11:29:07)*

*Tiu ĉi laŭvorta poem-angligo troviĝas en <http://max.mmlc.northwestern.edu/~mdenner/Demo/texts/angel.html>.*

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27) en la Germanan de N. N. 98.*

*Arg-1039-2112 (2014-06-03 17:30:50)*

*Tiu ĉi poem-germanigo troviĝas en la retejo <http://maschas-buch.blogspot.de/2011/09/lermontov-der-engel.html>. Vidu ankaŭ: <http://home.arcor.de/berick/illeguan/lermont1.htm>.*